**EKO 2022**
Esperiga Komuniko

Subtene al la regiona, landa kaj loka agado

UEA · ILEI · IF EF

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek, Gbeglo Koffi, François Lo Jacomo

**ENHAVO n-ro 14> • UN • IJF • Hungario • Printempas • Radio • IL, PL < mar 3**

## Informilo el Nov-Jorko por UN

La oficejo de UEA en Nov-Jorko daŭre aktivas kaj produktas regule sian bultenon. Ĵus aperis numero 57, kun artikoloj pri la Tago de la Gepatra Lingvo kaj la Internacia Tago de Edukado. Ĝi krome memoras pri la Holokaŭsto, TEJO-seminario en Budapeŝto, la nova Eo-parola akademiana prezidanto en Katalunio (v. EKO 8) kaj la temaro por la UK en Montrealo. Ni alkroĉos la bultenon.

## Itala festivalo por junuloj ĉiuaĝaj

Ĉi-jare, finfine, la Internacia Junulara Festivalo (IJF) denove okazos ĉeeste. Laŭtradicie, ĝi estos organizata de la Itala Esperantista Junularo (IEJ), dum la paska semajno. Ĉi-jare ĝi okazos de la 13a ĝis la 19a de aprilo 2022 (do, antaŭ pasko). La Festivalejo estos spektakla gastejo por junuloj kaj sportistoj, meze de la Dolomita montaro, ĉe la landlimo inter Italio kaj Aŭstrio. La nomo de la loko estas Piani di Luzza kaj ĝi troviĝas 4 km for de la fama ski-centro Sappada. La retpaĝo de la gastejo 'Bella Italia' libere konsulteblas ĉe: http://www.bellaitaliadolomiti.com/.

La loko estas atingebla el la aŭtoŝoseaj landlimoj (Tarvizo, Brenero kaj Triesto), ankaŭ per publikaj transportiloj (ĉefe aŭtobusoj). Se vi emas flugi, la plej proksimaj flughavenoj estas Venecio (VCE), Triesto (TRS), Trevizo (TSF). Por la flugemuloj, ni planus organizi apartan servon de aŭtobusoj. Do sciigu nin pri viaj alven-lokoj.

La baza loĝado estos en 4-6-litaj ĉambroj, ĉiuj ekipitaj per propra banejo, televido, kaj ĉiuj servataj de WiFi. Estos disponeblaj du- kaj unu-litaj ĉambroj. Dum la tuta aranĝo ĉiuj sportaj ekipaĵoj de la festivalejo estos je libera dispono de la partoprenantaro, inkluzive de la naĝejo 25-metra kaj de la saŭno.

La programo inkluzivos prelegojn, seminariojn, lingvajn kursojn, koncertojn kaj artajn aranĝojn. Oni planas organizi seminarion pri la lingvaj komunumoj de la teritorio. En tiu regiono estas komunumoj kiuj parolas variantojn de la furlana lingvo, kaj eĉ germanlingvaj vilaĝoj (ekz. Sappada). La gastejo, pro sia amplekso (1300 litoj), estas aparte taŭga por grupoj, kaj ni do bonvenigos grupajn aliĝojn, por kiuj ni pretas aranĝi ankaŭ specifajn programerojn. Interalie, oni jam planis la starigon de rapida lingvokurso, kiu estos 30-hora kaj kiu je sia fino ebligos partopreni la ekzamenojn de la Itala Instituto de Esperanto.

Kiel indikite en la retejo (iej.esperanto.it/ijf/2022), la prezoj inkluzivas la programon, la loĝadon, la manĝojn (matenmanĝo, tagmanĝo kaj vespermanĝo), la koncertojn kaj la uzon de la naĝejo. Por grupa partopreno eblas ricevi apartajn rabatojn (ekz. la gvidanto de minimume 20-persona grupo partoprenos senpage).

## Hungara informado


TÖRÖCSIK MARI VOLT AZ OSZTÁLYTÁRSA

La senlaca ĉefdelegito kaj kotizperanto en Hungario, s-ino Ködmönné Elizabeto, persiste kaj brile prezentadas nian lingvon al vasta publiko, kaj tion ŝi de jaroj faras, pere de la arta agado de ŝia Eo-grupo en Tatabanya. Elizabeto aĝas jam pli ol okdek jarojn. Homoj ĉiuaĝaj povas kontribui valore al nia afero!
La paĝo estas iom oblikva: klinu vian kapon je 5 gradoj por legi ĝin. Se via legokapablo en la hungara estas limigta (kiel mia), la kapklino estas superflua.
La artikolo aperis en unu el la plej vaste legataj virinaj gazetoj kun kiu Elizabeto de jaroj havas pozitivajn rilatojn. Tiaj valoraj kontaktoj kun ĵurnalistoj povas postuli jarojn da strebado por atingi, sed la rezultoj abunde pravigas tion.




## Printempe en Greziljono

La intensiva studperiodo "Printempas", post paŭzo de du jaroj, okazos en 2022 espereble kun vi! Aliĝu ĉe: gresillon.org/aligho

Niaj talentaj kaj junaj instruistoj preparos vin al KER-ekzamenoj. Legu en gresillon.org/printempo

Okazos tie ene de aprilo 1-5 2022, AMO-seminario 84 pri fervoja daŭripovo. Pliaj detaloj sekvos.

## Madagaskaro disradias aktivecon

Pli frue aperis la ELSENDO N°117 de Aminda Radio Esperanto en februaro. Interesa rubriko skizas la historion de islamo en Malagasio, kies unuan parton ni proponas en tiu ĉi podkasto. Ni traktas ankaŭ temon pri la produktado kaj komerco de freŝaj floroj en la ĉefurbo. Cetere, ni instigas vin aŭskulti iun kanton de Kjara Raggi por kundividi kun vi la belecon de la Esperanto-kulturo. La fino de la podkasto entenas kiel kutime etan lecionon pri la malagasa lingvo.

Ĉu vi jam spektis la centon da numeroj de niaj ĝisnunaj elsendoj ? Ĉu niaj podkastoj plaĉas al vi ? Ne hezitu donaci por subteni la aktivaĵon de la redaktoro.

https://youtu.be/OHAXN3g_YoM

Henriel FIDILALAO, lot IAG 27 B Antoetra, MG 102  AMBOHIDRAPETO, Madagascar

Skajpo: belafino
WeChat ID: henriel2018
Whatsapp: +261325303593
Monata revuo en Esperanto de mi prizorgata: *Panoramo de La Granda Insulo*
Respondecas pri la retradio AMINDA RADIO ESPERANTO alirebla ĉe:Jutubo, Linkedin kaj fejsbuko

## Israelo invitas aprile

Jen novaĵoj pri la Israela Kongreso okazonta inter la  7-a kaj 9-a de aprilo 2022.

Aliĝu ce eli@esperanto.org.il. Aliĝis jam pli ol dek eksterlandaj s-anoj, kaj al la postkongresa ekskurso aliĝis jam ok. Estos ses internaciaj artistoj kiuj prezentos riĉan artan programon (vidu https://www.esperanto.org.il/ik.html#programo).

La prezo ne inkludos la vespermanĝojn kaj ni do aranĝos komunan vespermanĝon en apuda malmultekosta rapidmanĝejo, kie ĉiu povos mendi laŭ sia gusto.

En la morgaŭa (jam okazinta ☺) Israela Virtuala E-kunveno Jehoŝua prezentos/is lingvajn enigmojn kaj kuriozaĵojn. Ĉu vi scias kio estas la diferenco inter arakido kaj juglando? Kiel diferencas kareo / karoo, kero kaj koriandro?

Atentu: ene de tiu kongreso okazos la 85a AMO-seminario kun la temo ‘Spacesplorado kaj scienca agado.’ Alirinformoj venos siatempe!

## Krakove denove



La Jagelona Universitato en Krakovo invitas esperantistojn el diversaj landoj al 27-hora Esperanto-kurso "Evoluigado de la skribo- kaj parolkapablo". Ĝi daŭros 2,5 monatojn. Ĉiu studanto ricevos lingvan helpon, laŭ siaj bezonoj. Instruos Maria Majerczak. Al la kurso ni invitas personojn kun meznivela aŭ iom pli alta lingvoscio (B2-C1). La studintoj ricevos oficialan konfirmilon pri la partopreno.

Studu realtempe, unufoje semajne, kun diverslandaj amikecaj esperantistoj, restante en via hejmo!. Por peti pli da informoj, bv. skribi al:

esperanto.instruado.jag.univ.pl<ĉe>gmail.com

Maria Majerczak,
Gvidantino de la Esperanto-instruado kaj agado en la Jagelona Universitato

# Liptova klubo en Slovakio  refoje akceptis gastojn

Jen profesiece pretigita filmo, el urbeto jam konata al ni AMO-aktivuloj. En 2016 vilaĝo en tiu mondparto akceptis la 19an AMO-seminarion, kiu unuafoje alprenis turisman temon. Komence de la vidbendo, mi vidis iun, kiu partoprenis apud Budapeŝto en la unua AMO-seminario en la surinsula vilaĝo Hórany.

https://youtu.be/0Z5Ro4GoN78

Pretigis la profesinivelan filmon: Peter Rybín

Averto al eksterlandanoj: Jen unika eblo ekzerci viajn kapablojn en la slovaka lingvo (ja subtitolita). Sed estas ankaŭ komentario en Esperanto, plejparte el la paroloj de Petro Baláž. La pli energiaj el la partoprenantoj atakis kaj konkeris la apudan montegon Poludnica, inkluzive de ne tute juna homo, kiu laste spertis la viruson Covid, kaj ne regajnis ĉiujn siajn fortojn.

Tiu montgrimpado estas vere ĉiujara defio – la aranĝo havas 40-jaran historion!  La cetera enhavo estas ege varia kaj bona, interalie pri la Universala Kongreso en Nitra en 2016 kaj la populara aranĝo SES.

Longa filmo, sed vere indas la spektado! (opinio SMG)

# Fama hungara verko aperis en la malta lingvo pere de Esperanto

Nun mi ricevis la informon de la tradukinto, en la maltan, de ‘La Tragedio de l' Homo’, ke li finis la laboron. Lia nomo estas Carmel Mallia. Li nun serĉas eldoniston por la teksto. Li maltigis la dramon el la Esperanta versio de Kálmán Kalocsay. La hungara verkinto estas Madách Imre.

Elkoran gratulon al la tradukinto!

Jozefo Horvath, www.vortaro.hu

Komento SMG: Ni kredis la movadon en Malto ne plu vivkapabla kaj ĝi malaperis el la listoj de UEA. Tamen klare, oni agas literature!

========= vortoj:  1190 =========

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis la **fino de 2021** (per EKO 2021-58). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro depost 2014.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.